

La Espero

2007: 2



Esperanto i Stockholm

På Esperanto Centro i Stockholm deltar tiotalet esperantister i ett seminarium om litteratur på esperanto.

10 mars föreläste Leif Nordens storm om litteratur på esperanto: romaner, noveller, poesi och barnböcker.

Det blev en livlig diskussion om varför författare skriver litteratur i original på esperanto. Olika svar är: för att uttrycka sig, för att få läsare i många olika länder, av kärlek till esperanto och för att tjäna pengar.

Föreläsningsserien fortsätter med andra föreläsare och andra teman.

Foto: Ole Hansen.

Esperanto i Tanzania

I det här numret av La Espero kan vi på sidan 3 läsa en rapport av Anita Dagmarsdotter som har besökt esperantister i Tanzania. Här är några samlade kring en buss med reklam för esperanto.

Esperantorörelsen i många afrikanska länder är fortfarande en mycket ung rörelse med många unga medlemmar och mycket entusiasm.

Läs mer på sidan 3.

Foto: Anita Dagmarsdotter.



Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
 Monato 2007 • 95-a jarkolekto
 Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: esperanto@globalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2007: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,

Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
 tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2007:

Direktansluten medlem 200 kr.
 Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
 Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

Postgiro: 578-5. **Nätsida:** www.algonet.se/~eldona/

E-post: eldona@telia.com **Telefon:** 031 - 12 05 94.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se **E-post:** egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11

961 76 Boden, tel. 0921-123 54

e-post: esperanto@globalnet.net

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5	30 september	31 oktober
Nr 6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Ingrid Maier



Kie vi naskiĝis?

En Taillfingen, en sudokcidenta Germanio, ne longe for de Svislando kaj Francio.

Kie vi loĝas?

En Uppsala ekde 1977, do jam 30 jarojn ...

Pri kio vi laboras?

Mi estas profesorino pri la rusa lingvo ĉe la universitato de Uppsala. Mia ĉefa esplorintereso estas tradukoj en la rusan de okcidenteŭropaj (ĉefe german- kaj nederlandlingvaj) gazetoj kaj pamfletoj kun politikaj novaĵoj, faritaj en Moskvo dum la 17-a jarcento.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Lingvoj, historio, danci, naĝi, skii, glitkuri.

Ĉu vi havas familion?

Mi havas du filinojn, Torun Jansson (26) kaj Astrid (23). Ili ambaŭ estas memstaraj kaj ne plu loĝas hejme.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

Mi lernis Esperanton kiam mi estis

11-jara, en infana grupo post la lernejaĵoj horoj. Estis mia unua fremda lingvo, kaj la rapida ellerno eble "kulpas" pri tio ke mi poste fariĝis profesia lingvisto.

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Mi havis, en mia junaĝo: mi estis sekretariino de Germana Esperanto-Junularo dum multaj jaroj; mi ankaŭ estis en la Konstanta komitato por la Internaciaj seminarioj. Sed jam de longe mi ne havas taskojn en la movado.

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

Bedaŭrinde mi ne legas librojn — mi nur verkas ilin. En Esperanto mi verkis nur unu libron (kune kun Wouter Pilger, kiu bedaŭrinde jam ne plu estas inter ni), kiu temas pri miaj sciencaj intereso.

La titolo estas "Duamana traduko por la Rusa Caro. Pri 17-a-jarcentaj novaĵ-tradukoj en "Vesti-Kuranty"; la libreto aperis en 2000. Ĝi temas pri novaĵ-tradukoj el okcidentaj lingvoj en la rusan ĝenerale, kaj specife pri unu konkreta traduka, kiun ni nomis "duamana" ĉar temis pri teksto verkita origine en la hispana, poste tradukita en la nederlandan; la rusaj tradukistoj (kiuj ne konis la hispanan version) do tradukis tradukon, ne ĉiam tute perfektan. Konsiderante, ke ili havis nek vortarojn, nek modernajn rimedojn (ekzemple interreton), ni venis al la konkludo ke ili faris bonegan laboron.

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Tion mi ne scias, tion devus prijuĝi iu alia.

Skribe intervjuis: **Leif Nordenstorm**

Estimataj samideanoj!

En la antaŭa numero de *La Espero* mi skribis ke estas - 27 C. Nun mi ĝojas rakonti ke la neĝo en Boden jam degelas. Pro tiu simpla fakto mi tre ĝojas. Oni ofte ĝojas plej multe pro simplaj fenomenoj. Mi tre ĝojis la pasintan semajnfino kiam mi prelegis pri Esperanta literaturo en EsperantoCentro en Stokholmo. Mi ĝojis ĉar mi povis paroli kun aliaj esperantistoj pri literaturo. Mi ĝojis ĉar EsperantoCentro estis bele pentrita per blanka farbo. Mi tamen ĉefe ĝojis ĉar mi povis renkonti esperantistojn. Ekzistas pluraj eblecoj renkonti esperantistojn dum la venontaj monatoj. Ĝuu tion!

Via redaktoro

Vojaĝo al Tanzanio

Tanzanio ĉi-jare jam havis vizitojn de almenaŭ tri svedaj esperantistinoj. Hazarde ni ne renkontiĝis, sed niaj tanzanaj amikoj ege ĝojis pro la gastoj. Juna Anna vizitis Daresalamon kaj dua juna Anna Mūanzan komence de Februaro.

Mi mem vizitis unue vilaĝon ekster la urbeto Bunda ĉe la Viktoria lago, kie loĝas Mramba Simba, kiu kore salutas al konatuloj. Mramba, nun estas kvartalestro – kompareble kun komunumestro ĉe ni – por kvin vilaĝoj. Li daŭre aktivas kaj per helpo de esperantistoj povis altiri monon kaj konstrui lerneajn konstruaĵojn en vilaĝoj. Kelkaj usonaj donacintoj mem venis por kunhelpi konstrui. Mramba deziras, ke aliaj sekvu iliajn ekzemplojn. "Ĉion donis al mi Esperanto" diris Mramba dum vojaĝo al vilaĝo en lia buseto nomata "Esperanto".

De tie mi daŭrigis al Mūanza kaj renkontis plurajn konatulojn, inter aliaj tri virinajn esperantistojn. Virinoj ne tre videblas en la afrika movado. Mia gastiganto Ambrose Polle kaj lia juna edzino salutas.

Fine mi renkontis geamikojn en Daresalamo. De tiuj Costantine Mashauri kaj Nyambona Massamba estas plej konataj en Svedio. Ambaŭ bone memoras siajn vizitojn ĉi tie kaj esperantistojn, kiujn ili renkontis, ekz. en Karlskoga kaj Lesjöfors.

Oni petis min transdoni kelkajn vortojn: eksterlandaj kontaktoj estas ege gravaj, ili estas vitaminoj al la juna afrika movado. Oni bonvenas vizitontojn, sed ankaŭ bezonas korespondajn kontaktojn. Dum la las-



La buseto nomata "Esperanto". Fotis: Anita Dagmarsdotter.

taj jaroj retmesaĝoj anstataŭis leterojn, sed por afrikanoj ekster la grandurboj tio ne estas bona evoluo. Komputeroj ne estas ĝeneralaj kaj eĉ ne en ĉiu urbo ekzistas retkafeto. Ekzemple Mramba Simba devas veturi preskaŭ 200 kilometrojn al la plej proksima retkafeto. Komprenu, ke la retaj maloftas! La tanzanoj bonvenigas, kaj bezonas, novajn korespondamikojn.

Antaŭ iom pli ol 20 jarojn mi venis unuafoje al Kenjo kaj Tanzanio. Mi nun povis konstati, ke multo ŝanĝiĝis dum tiu periodo. En la grandurboj la evoluo al moderna vivo plej videblas

kaj rapidas. En Daresalamo konstrulaboro okazas en preskaŭ ĉiu kvartalo. En foraj kamparaj lokoj la vivo ankaŭ ŝanĝiĝas, sed je pli malgranda rapideco. Mi havis eblecon renkonti pokotajn virinojn en okcidenta Kenjo, kiuj kun ĝojaj voĉoj rakontis pri nuntempa ebleco paroli en la komunumo. Mi renkontis la unuan pokotan universitatan studentinon kaj aŭskultis ŝian rakonton pri la revoj de ŝi kaj la gepatroj, ke ŝi antaŭenigos sian popolon. Sed mi ankaŭ spertis la doloron en grupo da virinaj gvidantoj, kiam venis novaĵo, ke la sekureca polico "purigis" vilaĝon, forbruligis ĝin kaj mortigis ĉirkaŭ 200 vilaĝanoj, ĉefe virinoj kaj infanoj.

Spite al la negativaj spertoj la restanta impresado estas, ke Afriko estas survoje al pli forta rolo. La Orientafrika unuiĝo somere pligrandiĝos, kiam Burundio kaj Ruando kuniros kun Kenjo, Ugando kaj Tanzanio. La orientafraka regiono ofertas multon al la vizitanto: bela naturo, vigla besta vivo kaj longaj sablaj strandoj por ĝui la Hindan Oceanon. Por esperantistoj ĝi ankaŭ ofertas gastemajn samideanojn.

Anita Dagmarsdotter

Esperanto en Afriko - vigla movado

Afriko konsistas en multaj landoj. Esperanto alvenis al diversaj landoj en malsamaj tempoj.

Oni tamen povas ĝenerale diri ke en la 1980-aj jaroj Esperanto plifortiĝis en multaj afrikaj landoj kiel ekzemple: Tanzanio, Togolando, Madagaskaro, Benino, Kamerunio, Senegalio k.t.p.

En tiu ĉi numero de La Espero ni legas la ĉi-supran raporton pri vizito en Tanzanio.

En paĝo 6 ni legas raporton pri filmo pri Instituto Zamenhof en Togo-

lando.

Jam multaj svedaj unuopaj esperantistoj kaj Esperanto-klubo havas kontaktojn kun Afriko. Ni povas ekzemple mencii la klubon en Lund kiu kunlaboris pri konstruado de sunkuiriloj kaj ricevis subtenon de SIDA por tio.

La redaktoro de La Espero ĝojas, ĉar lia libro "Arne, la ĉefido" nun estas tradukita al la madagaskara lingvo. Kompreneble dank' al Esperanto.

Do ekzistas multaj eblecoj kunlabori.

STF hyllar Lennart Svensson

Esperanto-Gårdens föreståndare Lennart Svensson hyllades nyligen vid STF:s kretsårsmöte på Värmlands museum i Karlstad. Han tilldelades Svenska Turistföreningens diplom och förtjänstmärke för, som det heter "den utmärkta framgång, med vilken Ni främjat de intressen Svenska Turistföreningen står för".

Tilldragelsen ägnades stor uppmärksamhet i lokalpressen och Lennart passade på, sin vana trogen, att informera de närvarande om esperanto.

Bengt Nordlöf

Martin kaj La talpoj

Jen pli ol jardeko ke Martin Wiese ĉefrolas en la esperanto-rok-kronikoj, unue kiel gitaristo kaj ĉefkantisto de Persone, unu el la pioniraj rokbandoj en la ĝenro, kaj li revenas post neeltenebla foresto per sia unua soloalbumo kiu entuziasmigis liajn multnombrajn fanojn.

Male al iuj aliaj bandoj origine roka, Martin ne klopodis saĝigi elektante pli dolĉajn sonorajn. Kaj eĉ se la albumo "Sen" de Persone (VKKD50), tute akustika, povus lasi imagi evoluon en tiun direkton, la ŝatantoj de fortaj sentoj certe ne estos seniluziigitaj! Akompanata de La Talpoj, Martin elektis rokon melodian kaj foje eĉ "grunĝan" el kiu aperas reliefo, persone, lia voĉo kaj liriko, tre tipe rekoneblaj, kaj sen malstreĉiĝi.

Por la ideo ke li estas artisto izolita en sia fako kiel aŭtoro, komponisto, kaj interpretisto; Martin Wiese rivelas ankaŭ sian grafistan talenton regalante nin per portreta kovrilo mempentrita, kiu respiegulas sian blu-urbecan kaj fantastan universon!

Tiu KD entenas ankaŭ du muzikvideojn (klipojn), el kiuj unu spekteblas en nia rubriko, ekde nun konstanta ĉe Vinilkosmo.com, kaj unu MP3 titolita "Homoj kiel mi Roĝer" Borĝes Remiks" kies daŭro estas preskaŭ 8-minuta por nutri vian MP3-poŝludigilon aŭ ipodon.

Por kreaĵo titolita "Pli ol nenio" eblas konkludi senkomplekse ke temas pri "io" aldonenda al via kolekto kaj elstara ekzemplo de realiĝo kiun ni esperas vidi ekflori senbride eston-

te.

Dankojn kaj gratulojn al Rogener Pavinski realigisto de la brazila videoproduktejo Kosmuzik' por la dua muzikvideo de la KD filmita dum viva koncerto de Martin en KEF 2005 en Helsinko!

Por pliaj informoj kaj por aŭdi pli: www.myspace.com/martinwiese

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi: www.vinilkosmo.com/?disc=vkcd87&lng=e

DC

Mi estas tiel ĝoja!

Tiel skribis Anna Bodén al mi sur la responda letero al la letera kurso.

Anna aĉetis START-pakaĵon en novembro kaj komencis respondi al la leterkurso fine de la monato. Ŝi elektis Esperanton, kvankam ŝi ne sciis pri iu kiu lernis tiun lingvon.

En ŝia responda letero al letero numero 6, mi ricevis vere interesan aldonon:

Saluton Roland!

Mi ĵus trovis interrete www.lernu.net kaj mi registris min por lerni pli kaj por atingi esperantistojn en aliaj landoj.

Nun mi jam ricevis tri novajn amikojn - unu en Usono, unu en Brazilo kaj unu en Japanio.

Ni skribas facilkompreneblajn mesaĝojn inter ni, kaj fakte, ne estas malfacile kunmeti frazojn kiam mi vere provas.

Mi ne certas ke miaj frazoj estas tute ĝustaj, sed ŝajnas al mi ke la aliaj komprenas min.

Esperanto vere malfermas limojn kaj donas senton de komuneco.

Mi estas tiel ĝoja pro mia decido studi Esperanton, kaj mi certe estos eĉ pli ĝoja estontece, kiam mi, laŭ mia espero flue parolos.

Ĝis! Anna

Anna, kiu studas ĉe gimnazio en Östersund, petis min trovi iun esperantiston en la proksimeco.

Mi sciis pri alia Anna en Östersund, kiun mi renkontis en Lesjöfors antaŭ du kaj duona jaro, en la somera kurso.

Mi trovis ŝin telefone kaj tiam montrighis ke ŝi estis invitita al unu el la gimnazioj por prelegi pri esperanto!

La instruisto de la gimnazio, kiu kontaktis Anna, hazarde aŭskultis radion kiam Anna estis intervjuata pri nova muzika disko, nome de "La per-

dita generacio".

Mi petis ŝin kontakti "mian" Anna (Bodén), kaj ŝi faris.

La 14-an de februaro ili ambaŭ iris al tiu gimnazio por informi pri esperanto antaŭ dudeko da gimnazianoj kaj kvar lingvoinstruistoj. Letero unu estis disdonata al ĉiuj.

Ankoraŭ unu Anna loĝas en Östersund. Ankau ŝi vizitis la kurson en Lesjöfors. Pro studoj ŝi estas en Tanzanio.

Roland Lindblom

Buss till Esperanto-Gården

På onsdag kväll den 16 maj kör Charterbuss en tur från Stockholm till Esperanto-Gården via bl a Västerås Filipstad. För den som åker med betyder det en extra dag för semester och möjlighet till sköna promenader i Lesjöfors på torsdagen. Såvida man inte tar chansen att avlägga examen i esperanto förstäs.

Bussen går kl 18 från Cityterminalen med ankomst Lesjöfors omkring kl 23.

Återresa på söndag vid lunchtid med buss, eller samåkning de första milen i bilar, beroende på antal resenärer.

Ytterligare detaljer publiceras på Esperanto-Gårdens hemsida, <http://e-g.se/>

Information även vid Stockholmsklubbens möten.

Bengt Nordlöf

Ĉu vi jam vizitis

www.lernu.net

?

Carl von Linné (1707-1778)

Carl von LINNÉ (esperante Karolo Linné) (naskiĝis la 23-an de majo 1707 en Stenbrohult, Svedio; mortis la 10-an de januaro 1778 en Upsalo) estis sveda kuracisto, botanikisto kaj profesoro de la Universitato de Upsalo, kiu enklasis la naturaĵojn de la Tero en sia verko *Systema naturae* (1735). Lia enklasingo de animaloj kaj plantoj fariĝis la semo kaj normo de la moderna sistemo (sed ne lia enklasingo de mineraloj).

Kvankam oni internacie nomas lin latine Carolus Linnæus, tio ne estas tute korekte. Li nomiĝis tiel (aŭ Carl Linnæus) kiam li naskiĝis, sed kiam li nobeliĝis en 1757 li mallatinigis sian nomon al Carl von Linné.

homo = Homo sapiens

Linné donis al ĉiu specio koncizan nomon en la latina de du partoj: ekzemple, Homo sapiens ("homo scianta") por homo kaj Homo troglodytes ("homo de la kaverno") por la ĉimpanzo. En la tago de Linné, sciencistoj donis al specioj longajn priskribajn nomojn, kiuj eĉ ne estis normigitaj.

La unua parto de la nomo estas la nomo de la genro, la dua de la specio. Do Linnaeus rigardis la homon kaj la ĉimpanzon kiel du specioj de la sama genro, Homo. (Hodiaŭ, la scienca nomo de la ĉimpanzo estas Pan troglodytes, kvankam ĉimpanzoj ne loĝas en kavernoj).

La ideo de genro kaj specio venis el Aristotelo. Sed el la genroj, Linnaeus kreis ordojn, el ordoj, klasojn kaj el klasoj, regnojn. Ekzemple, Linné klasigis homon tiel:

- Regno: Animalia
- Klaso: Vertebrata
- Ordo: Primates
- Genro: Homo
- Specio: Homo sapiens

La tri regnoj de Linné estis animaloj, plantoj kaj mineraloj.

Linné estis pia luterano kaj rigardis biologion kiel la studon de la ordo kreita de la Eternulo. Li kredis, ke la specioj estas realaj (kaj ne arbitraj) kaj neŝanĝeblaj (kontraste al Darvino, kiu rigardis la speciojn kiel ŝanĝeblajn).

Linné faris plurajn vojaĝojn al periferiaj partoj de Svedio; liaj disĉiploj studvojaĝis en la tuta mondo.

Verkoj:

- *Systema naturae*, 1735/1766 (Sistemo de naturo)
- *Genera plantarum*, 1737 (Genroj de plantoj)
- *Materia medica*, 1749
- *Philosophia botanica*, 1751 (Filozofio botanika)
- *Species plantarum*, 1753 (Specioj de plantoj)

Laŭ Vikipedia

Dags att söka stipendium

Det är dags att söka årets Märthastipendium. I korthet innebär det att stipendiaten får ett bidrag på ca 2000 kronor till reskassan till något esperantoarrangemang. Ansökan ska vara inlämnad innan 31 mars.

Alla detaljer står här: www.tejo.org/seju/marta.shtml


Magnus

ordförande i SEJU

Novaĵoj!



La Frakseno Igdrasil. 200 SEK.



Mio, mia filo. 125 SEK.
Mendu ĉe www.algonet.se/~eldona aŭ per la adreso sur paĝo 2.

NEKROLOGO

Anders Kohlm

Ni informas pri la forpaso de Anders Kohlm, kara membro de la klubo en Upsalo dum pli ol 20 jaroj.

Ni kondolencas al liaj familianoj kaj la klubanoj.

LINGVISTIKO

Oklara uttryck

Proksima Oriento = Främre Orienten (Främre Asien). Fjärran Östern (Bortre Orienten) = *Malproksima Oriento*. Mellanöstern (Mellersta Östern) = *Meza Oriento*. Betydelsen hos Främre Orienten och Mellanöstern har förändrats stegvis sedan 1800-talet. Numera omfattar Mellanöstern även Främre Orienten och delar av Nordafrika, medan Främre Orienten har fallit ur bruk.

Uttrycken är inte bara oklara utan speglar dessutom ett kolonialistiskt tänkande med Europa i centrum. På esperanto är det därför bättre att använda tydliga och neutrala termer som: *okcidenta Azio, suda Azio, sudo-orienta Azio, orienta Azio, norda Afriko*, osv.

Bertil Wennergren

Det här är några exempel på "fallgropar". Fler hittar man på hemsidan bertilow.com

Kandidatoj por la Nobel-premio

Ĝis 2006 la skoto William Auld estis la ununura Esperanto-verkisto, kiun oni kandidatigis por la Nobel-premio de literaturo.

La Esperanta PEN-Centro referendumis inter siaj membroj pri la eventuala kandidato al la Nobel-premio pri literaturo. El la selektita kvino (Marjorie Boulton, Miguel Fernández Martín, István Nemere, Giorgio Silfer, Spomenka Stimec) du verkistoj ricevis tri, respektive ses voĉojn. Ĉi-lastaj, akceptinte la proponon, estos kandidatigita por 2007. Laŭ pli frua interkonsento, por respekti kiel eble plej skrupule la regularon de la Nobel-premio, la nomo de la kandidato estos publike diskonigita nur post oktobro.

La Esperanta PEN jam decidis apogi la kandidatecon de Umberto Eco, kiu estis indikita de pluraj membroj. Siavice, Vinko Oshlak (prezidanto en fino de mandato) proponis ankaŭ Alojz Rebula, slovenan verkiston.

Esperantlingva Verkista Asocio decidis kandidatigi la islandan poeton Baldur Ragnarsson.

Nova vortarego

En aprilo 2007 aperis en Hamburgo/Germanio Granda Vortaro Germana-Esperanta (Grosses Wörterbuch Deutsch-Esperanto). Tiu vortaro enhavas pli ol 160.000 serĉvortojn kaj parolturnojn sur 1679 paĝoj grandformataj kaj do estos la plej granda Esperanto-vortaro iam aperinta en la mondo. La fama lingvosciencia eldonejo BUSKE-Verlag aperigis jam en 1999 (tuj antaŭ la UK en Berlino) la ampleksan vortaron Granda Vortaro Esperanto-Germana (882 p.). La eldonejo estas rete kontaktebla pere de www.buske.de

Revuo Oomoto en la reto

La nova japana religio "Oomoto" ekde la 1920-aj jaroj eldonas esperantlingvan revuon "Oomoto". Ekde 2007 ĝi ne plu aperas papere, sed en la reto, do senkoste legebla por ĉiu. Legu en www.oomoto.jp/esrevuo/Oo453.pdf

Ĉu la transiro de papera al reta gazeto estas avantaĝo aŭ malavantaĝo? Tion oni certe povas diskuti.

Proponu por nova premio

La Organiza Komitato de la Internacia Esperanto-Semajno decidis starigi la premion je la nomo de Ada Sikorska Fighiera, destinatan al esperantist/in/o, kiu akiris meriton en la laboro por Esperanto.

La Premio konsistos el medalo kaj diplomo, sur kiu, krom la nomo de la Internacia Esperanto-Semajno, aperos reliefa bildo de Ada Sikorska Fighiera kaj dorsel la gravurita nomo de la premiito, dato kaj loko de la Semajno.

La Premio celas publike agnoski gravan kaj sindediĉan laboron pro la bela ideo de esperantismo faritan de meritplena esperantisto aŭ esperantistino en kiu ajn loko de la mondo.

Donante al la Premio la nomon de la forpasinta kaj ĉie amata Ada Sikorska Fighiera, kiu ĝis sia morto konstante laboris por Esperanto (inter alia eldonante sinsekve en Bruselo, Madrido kaj Torino dum 34 jaroj la tiaman gazeton "Heroldo de Esperanto"), la Organiza Komitato intencas stimuli la esperantistojn sekvi ŝian noblan ekzemplon je la servo de nia kara idealo.

La proponoj por la Premio devas esti alsenditaj de loka, nacia aŭ internacia Esperanto-Grupo, Klubo, societo aŭ organizo, aŭ de esperantisto antaŭ la 15-an de aŭgusto 2007, al la prezidanto de la Premia Komisiono: G.C.Fighiera, Via Sandre 15, IT-10078 Venaria Reale (Torino), Italio <[giancarlo.fighiera\(at\)libro.it](mailto:giancarlo.fighiera(at)libro.it)

La Premia Komisiono konsistas el: Louis Serrano Pérez, Santiago Torné, Salvador Aragaj, Francesc Mas.

Filmo pri Institut Zamenhof

En februaro 2007 aperis en Nederlando nova filmeto sur DVD-disko, 12-minuta pri la historio de Instituto Zamenhof. IZO estas privata lernejo en Togolando, kiu instruas la kutimajn lerneajn fakojn al 300 lernantoj, de 6- ĝis 16-jaraj. Ili krome lernas esperanton, komputiladon kaj aliajn ne-kutimajn fakojn.


Krome IZO gastigis la Afrikan Oficejon de UEA de septembro 2004 ĝis decembro 2005, kaj poste la Afrikan Centron Esperantistan, kiu estas sendependa de iu ajn organizajo, esperanta kaj ne esperanta. En IZO okazis kaj regule okazas seminarioj, kur-

soj, kunvenoj; interalie la unua Afrika Esperantologia Semajno, kunlabore inter TIETo (posedanto de IZO) kaj KCE el Svislando, ambaŭ aliĝintaj al la Pakto por la Esperanta Civito. IZO do estas stabila kaj konstanta edukejo de kapablaj esperantistoj.

La filmeto estas trifoje registrita sur la lumdisko, en la nederlanda, en la franca kaj en esperanto. Ĝi celas interesi unuavice neesperantistojn, por ke tiuj ĉiujare subtenadu la lernejon per donaco de 50 eŭroj. Mendoj tra info@eenschoolintogo.nl.

LIBROJ

Teoria artikolaro



Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado. Humphrey Tonkin. UEA. Rotterdam. 2006. 159 paĝoj.

Humphrey Tonkin estis unu el la plej konataj gvidantoj de la Esperanto-movado dum la pasintaj kvardek jaroj. En la Universitato Adam Mickiewicz en Pollando li prelegis en kurso pri interlingvistiko. Tiu ĉi libro estas kolekto de liaj prelegoj pri la lingvo kaj ĝia rolo ĝis esploroj kaj estonteco, tra lingvopolitiko, lingvokultivado, eksteraj rilatoj, strukturoj k.a. Ne utilas simple mencii ĉiujn ĉapitrojn de la libro. La libro estas interesa por tiuj, kiuj interesiĝas pri la historio kaj estonteco de la Esperanto-movado, kaj pri nunaj problemoj en ĝi.

Leif Nordenstorm

12 - 19. majo **59-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)** en Parizo. Inf: AFCE/UAICF 59-a IFEFF-Kongreso, 9 rue du Château-Landon, FR-72010 Paris, Francio. Tel.: +33(0)1 48 53 05 52, rete: sylviane.lafargue@sncf.fr

18-20. majo **Sveda Esperanto-Kongreso** en Esperanto-Domo en Lesjöfors. Informojn vi trovis en La Espero 2007:1.

24-30 junio **Someraj kursoj** en Esperanto-Domo. Malnovaj amikoj kaj novaj studos diversnivele, infanoj kiuj ĉiujare venas lernos kaj ludos, helajn vesperojn plenigos muziko kaj danco kaj ni iun tagon ekskursos al vidindaĵo kaj strando. Krom la kutimaj lingvaj kursoj, ni organizos en 2007 esperantologian seminarion. Ricevu rabaton se vi venas kun infano(j). Ankaŭ tendumi eblos. www.e-g.se

14 - 22. julio **43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-43)** en nordlitovia urbo Siauliai. Inf.: Litova Esperanto-Asocio, rete: litova.ea@mail.lt

21 - 26. julio **BEF-4 (Balta Esperanto-Forumo)** en Kaliningrado (Ruslando). Inf: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando, Tel.: +7-4012-656033 Rete: sezonoj@gazinter.net aŭ sezonoj@yandex.ru

21 - 28. julio **18-a Ekumena Esperanto-Kongreso 2007**, 60-a kongreso de IKUE, kaj 57-a kongreso de KELI en Pelplin, Pollando. Inf: Eichkorn, Bernhard aŭ Kozyra, Eduard, PL-83-130 Pelplin, Strzelnica 8 esperanto@powiat.malbork.pl aŭ Jadwiga Wasiuk

23- 27. julio **Esperanto-kursoj** (elementa kaj por progresantoj) en la Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Ebleco kunvojaĝi ŝipe al festivalo Arta Lumo. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, sekretario Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 Turku, Finnlando tel. +358-2-2305319, eafsekretario@esperanto.fi

27. julio - 1. aŭgusto **Festivalo Arta Lumo**, Kuopio, Finnlando. Multflanka kultura aranĝo kun bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj en ĉarma ĉelaga urbo. Antaŭekskurso al la monaĥejo Valamo de kie ŝipvojaĝo al Kuopio. Inf.: Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando, ArtaLumo@esperanto.fi

28. julio - 3. aŭgusto **Internacia Junulara Kongreso** en Hanoi, Vjetnamo

1 - 8. aŭgusto **Internacia Junulara Semajno, IJS** en Hungario. Inf: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87. HU-1675 Budapest, Hungario. ijs@ijs.hu

4 - 11. aŭgusto **92-a Universala Kongreso de Esperanto** en Jokohamo, Japanio. Inf: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +3110-4361044, fakso: +3110-4361751. Rete: uea@inter.nl.net

11 - 19. aŭgusto **40-a Konferenco de ILEI** en urbo Ranzan, Japanio. Inf: ILEI.ru

29. septembro-6. oktobro **15-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj turismo** Tossa de mar, Girona, Hispanio

www.eventoj.hu kaj aliaj

Deklaro okaze de la Tago de la Gepatra Lingvo

La gepatra lingvo kaj Esperanto: ne-disigeblaj lingvaj rajtoj de ĉiu homo.

"La gepatra lingvo estas kara al ĉiu el ni. En la gepatra lingvo ni eldiras niajn unuajn vortojn kaj esprimas niajn pensojn plej bone. Ĝi estas la bazo, sur kiu ĉiuj homoj disvolvas sian personecon de la momento, kiam ili spiras sian unuan spiron, kaj ĝi estas tio, kio subtenas ilin dum iliaj vivoj. Ĝi estas la rimedo por lerni respekton al si mem, al sia historio kaj al sia kulturo kaj, ĉefe, al aliaj homoj kaj al iliaj diferencoj."

Per ĉi tiuj vortoj la ĝenerala direktoro de Unesko, Koĉĉiro Matsuura, malfermas la ĉi-jaran mesaĝon por la Tago de Gepatra Lingvo, kiu estas celebrata ĉiujare la 21-an de februaro. Ĉiu parolanto de la internacia, neŭtrala lingvo Esperanto certe aprobas ilin, ĉar la parolantoj de Esperanto scias pri lingvaj rajtoj, kaj ilia agado celas protekti tiujn rajtojn ĉie en la mondo rilate al ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj. Neniu lingvo, fakte, estas tro malgranda, por ke oni malintentu kaj mistraktu ĝiajn malmultajn parolantojn. Ankaŭ ili estas homoj samvaloraj kiel ni kaj ankaŭ ili rajtas je respekto. Ila kulturo ne estas portanto de valoroj malsuperaj al tiuj de aliaj kulturoj, kiuj posedas la rimedojn por altrudi sin al ĉiuj.

Al la parolantoj de Esperanto apartenas ankaŭ la konceptoj, kiujn oni trovas en la deklaro, rilate al la graveco en la nuna mondo de harmonia kombinado inter diverseco kaj identeco, kio en nia kampo signifas kombinadon inter gepatra lingvo kaj aliaj lingvoj bezonataj por komunikado kun aliaj komunumoj proksimaj kaj malproksimaj.

Esperanto estas inter tiuj lingvoj la lingvo por rilatoj internaciaj je regiona kaj monda nivelo. Esperanto ne celas anstataŭigi la naciajn kaj lokajn lingvojn. Tio estu klara al ĉiuj. La parolantoj de Esperanto celas protekti ĉies lingvon kaj ĉies identecon.

Eraras la defendantoj de lokaj lingvoj kontraŭ ŝtataj lingvoj. Ili vidas nur sian problemon, kaj persiste tute ignoras la danĝeron de pli grandaj lingvoj, kiujn ili eĉ bonvenigas. Kontraŭ tiuj ili certe ne povos rezisti en la posta generacio. Esperanto celas defendi ankaŭ iliajn rajtojn, kiel asertis Zamenhof, kiam li parolis pri la ebla ut-

iligo de Esperanto en plurgentaj regionoj.

Eraras la defendantoj de naciaj grandaj kaj mezgrandaj lingvoj en Eŭropo kaj ĉie tra la mondo, kiuj vidas nur sian lingvon kaj sian kulturon kaj pensas, ke ili povas sukcesi savi sin mem, eĉ se ĉiuj aliaj pereos. Ili nur revas resti kiel la dua plej granda lingvo en la mondo. Alianco inter ili kaj la parolantoj de Esperanto estus avantaĝa por ĉiuj.

Eraras la amas-komunikiloj, kiuj de tempo al tempo atentigas kontraŭ la ebla forigo de ĉiuj lingvoj fare de Esperanto. Ofte ne temas pri eraroj, ĉar tiaj akuzoj venas de homoj kaj komunikiloj el landoj, kie oni parolas lingvon deklaran internacia, kaj kiu grandskale respondecas pri la malapero de lingvoj kaj kulturoj en la mondo nun.

Ni rediru nun tute klare: Esperanto estas nur dua lingvo por kontaktoj inter gentoj de malsamaj lingvoj, ĉiu el kiuj rajtas kontribui al la monda kulturo siajn konojn kaj siajn pensojn. En monda skalo nia riĉeco estas nia varieco, sed sen lingvo, kiun ĉiu same povas lerni facile kaj pro libera elekto, nur malriĉeco kultura kaj unuformeco tutmonda sekvas.

Esperanto ne havas armeon, kiu disvastigas ĝin. Esperanto ne havas ekonomiajn interesojn, kiuj devigas homojn lerni ĝin. Esperanto ne havas kulturalan industrion, kiu volas disvastigi siajn produktojn koste de lokaj alilingvaj produktoj. Esperanto nur havas la forton de racio kaj de justeco, pro kiu ĉiam pli multaj homoj libervole elektas ĝin por riĉigi sian internacian vivon, por koni aliajn kulturojn, por kontribui al pli justaj internaciaj rilatoj.

Renato Corsetti
Prezidanto de UEA

Ĉiujare okazas:

Meze de Februaro:

Semajno de internacia amikeco (iom malsamaj datoj ĉiujare)

21a de Februaro:

Tago de gepatra lingvo

26a de Septembro:

Tago de Eŭropaj lingvoj

15a de Decembro:

Tago de libro - en la Esperantomovado

Orienta fabelaro



"La regrifuzanto" kaj aliaj budhismaj fabeloj. Gunnar Gällmo. www.lulu.com 2006. 84 paĝoj.

Jen kolekto de fabeloj ĉerpitaj el malnovaj budhismaj tekstoj, rerakontitaj de Gunnar Gällmo. Multaj eŭroplingvaj versioj de budhismaj fabeloj ofte estas plenaj de budhismaj palidevenaj vortoj, nekompreneblaj por la ĝenerala publiko, aŭ kompreneblaj nur per librofina vortaro. Tiu ĉi libro tamen estas escepto. Mankas neologismoj nekompreneblaj por ordinara esperantistoj. Ĉar la stilo estas simpla la fabeloj estas ĝueblaj por ordinara homoj, kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. La aŭtoro lerte rerakontis la fabelojn, tiel ke oni povas legi ĝin aŭ por distra celo aŭ por lerni ion pri budhisma pensado pri la vivo. Verŝajne tio ankaŭ estis la celoj de la verkinto aŭ verkintoj: distrado kaj instigo al homoj pensi. Instigo pensi ja funkcias plej bone se oni samtempe distras.

Aparte plaĉis al mi la titola fabelo "La regrifuzanto", kiu temas pri juna reĝido, kiu rifuzas regi kaj simulas esti mense malfruiginta. Kial? Por ricevi la respondon vi devas legi la fabelaron. Gunnar Gällmo estas bona esperantisto. Mi trovis neniun esprimon por kritiki. La aliaj fabeloj temas pri eterna komencanto, aproj kaj tigro, cervo, birdkaptisto, monaĥo kaj Fingringo (jes majuskle).

Ankaŭ menciindas la teĥniko por multobligi tiun ĉi libron. Poekzemple presado (*styktryck*) signifas ke la presejo presas ekzempleron nur kiam iu kliento mendis ĝin. Tiu teĥniko evoluigis tiel ke "la regrifuzanto" aspektas same bele kiel ordinara libro. Por \$ 8,71 plus sendkostoj oni ricevas belan interesan libron.

Leif Nordenstorm

Tria eldono de furora libro



Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfekta kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la E-kultur. Boris Kolker. UEA. Rotterdam. 2005 (3a eld). 280 paĝoj.

Esperanto estas eble sola lingvo en la tuta mondo kiun eblas studi Interrete. Multaj personoj tion jam scias kaj la esperantaj kursoj, programoj kaj paĝoj kreskas kiel la fungoj post la pluvo. La Lernu, la Kurso de Esperanto, la Gerda Malaperis kaj multe pli. Sed ili rilatas al komencantoj.

Post ĉi tiuj kursoj mi havis grandan bezonon ekzerci miajn kapablojn en skribado, kaj samtempe kreskis scivolemo pri la esperanta kulturo kaj literaturo. Unuvorte mi serĉis kurson por progresantoj. Do, kion fari por plibonigi la lingvon sen translokiĝis de sia domo?

Mi trovis ĝin en la kurso de Boris Kolker "Vojaĝo en Esperantolando" La libro ne estas dika, kaj oni povus pensi ke nur 26 lecionoj ne bezonus

multajn monatojn.

Sed, ve kia eraro. Ĉiu leciono konsistas de diversaj tekstoj: poemoj, romanoj, faktoj pri movado aŭ prominentuloj, verkistoj. Vere iomete de ĉio. Interesa legado, konvene longaj partoj, konvene malfacilaj, kaj konvene diversecaj.

Post ĉiu leciono venas ekzercoj. Vere malsamaj. Ekzercado ne nur por mia lingvoscio sed ankaŭ por mia cerbumado.

Estis demandoj pri legitaj tekstoj, kiam oni devis pripensi la sencon de aliaj flankoj, trovi alian profundecon aŭ kontinuecon, eble trovi similecon en sia vivo. Estis ankaŭ tute fantaziaj demandoj kiuj reale trejniis mian menson.

Multajn horojn mi uzis por plenumi ĉiujn taskojn. Ĉiutage, vespere mi sidigis ĉe la komputilo kaj legis, tradukis, skribis. Ne malofte miaj familianoj devis helpi min en skribado iu fantazia rakonto.

Mi bezonis inter 10 -15 vesperojn por farado ĉiuj taskoj en nur unu leciono. Sed ĉar la taskoj estis amuzaj ankaŭ farado ilin estis amuzaĵo.

Kiam mi jam trastudis tutan lecionon kaj plenumis tutajn ekzercojn mi sendis ilin al Boris. Feliĉo post bonfarado ... libera tempo ... ripozo

Nur post kelkaj tagoj revenis ĉio plibonigita kun rimarkoj, demandoj kaj humorplenaj komentoj kaj oh, vespiro nova leciono

Sed fine, mi trapasis ĉiujn 26 lecionojn kaj ĝoje trarigardas la libron remorante miajn pensojn dum skribado kaj studado. La kurso prenis multe da mia tempo sed donis al mi kuragon, scion kaj memsekurecon. Mi daŭre eraras, akuzativo aperas en malbonaj lokoj, vortoprovizio bezonas daŭran kreskadon, sed mi tamen estas certa ke ĉi kurso evoluis kaj maturigis min.

Ursula Kwasniewska

Aĉetu Esperanto-librojn
en
EsperantoCentro en Stokholmo
aŭ en
www.uea.org